

# THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated



International Language

Vol. XXXV, No. 499/500

Nov./Dec. 1946

---

---

## YOU CAN CONVINCe YOUR FRIENDS

of the value and progress of Esperanto if you lend (or give)  
them a copy of

## THE LANGUAGE PROBLEM

and its solution

By E. D. DURRANT

The book which is full of facts for the propagandist, and is  
interesting reading for anybody.

*Note the new prices :*

Cloth 5/—, postage 5d. Paper 3/—, postage 4d.

*Published by*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.**

*Order from*

**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.**

**140 Holland Park Avenue, London, W.11**

---

---

# . . . Kaj Nun Ĉi Tiuĵ . . .

	s.	d.
“ <b>Petro</b> ”. (Laborista lernolibro) S.A.T. . . . .	2	6
“ <b>Leteroj de E. Lanti</b> ”. Redaktitaj de S.A.T. . . . .	5	3
“ <b>Tra Densa Mallumo</b> ”. Diversaj eseoj. Eldonita de Laborista Esperanto Klubo, Kopenhago . . . . .	3	0
“ <b>Cikoni-Kalifo, La</b> ”. M. Babits (Karlo Bodo) . . . . .	2	0
“ <b>Diablidoj</b> ”. N. Barthelmess . . . . .	1	0
“ <b>Eta Krestomatio</b> ”. Neergaard and Thorsen . . . . .	1	9
“ <b>Fera Kalkanumo, La</b> ”. Jack London (G. Saville) . . . . .	3	3
“ <b>Jimmie Higgins</b> ”. Upton Sinclair (K. Fröding) . . . . .	3	3
“ <b>Kapitanfilino, La</b> ”. A. S. Puŝkin (M. Ŝidlovskaja) } . . . . .	2	0
“ <b>Lanternisto, kaj aliaj prozaĵoj, La</b> ”. H. Sienkiewicz (Kabe) . . . . . cloth	7	0
“ <b>Mi serĉis oron kaj oleon sed trovis . . .</b> ” David Flood (Gustafsson) . . . . .	9	0
“ <b>Trovita Feliĉo, La</b> ”. Tibor Sekelj . . . . .		8
“ <b>Vortoj de Kamarado E. Lanti</b> ”. S.A.T. . . . .	3	3
“ <b>Skizo de Ekonomia Geografio</b> ”. J. F. Horrabin (B. Ross) . . . . .	2	6
“ <b>Evoluo de Telefono</b> ”. J. R. G. Isbrücker . . . . .	1	6
“ <b>Grekaĵoj</b> ”. D-ro J. Penndorf . . . . .	1	6
“ <b>Kemio de l’Universo, La</b> ”. Prof. A. Fersman (S. Rublev) . . . . .		9
“ <b>Vojo al Scienco de Estonto, La</b> ”. Prof. A. Fersman (S. Rublev) . . . . .		9

Aldonu 10% por afranko

*Mendu ĉe*

**LA BRITA ESPERANTISTA ASOCIO**  
140 Holland Park Avenue, London, W.11

# The British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

Vol. XXXV, No. 499/500

Nov./DEC., 1946

## TO OUR MEMBERS


I wish to take this opportunity to thank all those who responded so generously to the Special Appeal issued with the May-June number of the Journal. The amount so far received is slightly in advance of the minimum figure aimed at by the Council, and will be of immense help in the balancing of this year's budget.

Unfortunately, such a special fund benefits the current year only and does not alleviate the "headache" of the Council at the thought of continued high costs in 1947 and probably for some time to come. It is not the Council's policy, and goes very much against their wishes, to have to make special appeals to the members; it is obviously much more satisfactory to place the finances of the Association on a basis which will render such appeals unnecessary. It was for this reason, in view of much increased overhead expenses, that the annual subscription was raised, by decision of the Annual General Meeting, to 10/- for ordinary membership as from the beginning of 1947.

The Council's calculations, in fixing the amount of the increase, were based on present membership figures. Should any members feel that they cannot afford the increased subscription, I can assure them of my deep regret. As, however, the increase is comparatively small, and even the new rate by no means exorbitant, I trust that their number will be very small, and I do most earnestly urge everyone who can possibly do so, to help by renewing his or her membership for the coming year. It may well be a year of great possibilities, of vital importance to the Movement. Please do not let us be hampered in our efforts through lack of necessary funds.

MARGARET JAY,

*President.*



### WILLIAM BAILEY

William Bailey naskiĝis en Manchester la 24an de Decembro 1866. Li havis grandan talenton por la muziko kaj elektis la karieron de profesia muzikisto. Lian kapablon en tiu sfero atestas la faktoj, ke kiam nur 16-jara li estis preĝeja orgenisto kaj ke de 1917 ĝis 1931 li estis fagotisto ĉe la fama orkestro Hallé.

Li mem rakontis, ke li Esperantistiĝis en 1905, estante 38-jara, kaj ke li devis studi la lingvon sola per helpo de netaŭga lernolibro. Kiam li komencis studi la *Krestomation*, li trovis, ke li estas sur nekonata tero. Li do kolektis modelajn frazojn kaj esprimojn el tiu libro, por eltrovi por si la principojn laŭ kiuj Zamenhof konstruis sian lingvon. Li aĉetis aliajn lernolibrojn, kaj trovis, ke ankaŭ ili estas ofte neakordaj kun la Zamenhofa lingvaĵo. Li do persistis super la longa kaj teda tasko kolekti Zamenhofajn modelojn, ĝis li atingis la bezonatajn faktojn kaj povis senti sin sur firma kaj sekura tero rilate al la gramatiko kaj stilo de aŭtentika "klasika" Zamenhofa Esperanto. Jen kiel komenciĝis lia plej karakteriza laboro en Esperantujo.

Li konfesis iam, ke la memoro pri liaj penigaj klopodoj eltrovi la verajn fundamentaĵojn de la lingvo ĉiam inklinigis lin helpi la aŭtorojn de lernolibroj kaj vortaroj, por ke iliaj verkoj havu bazon seneraran, kaj tial neerarigan. Tiu memoro tiel same efikis por inklinigi lin ĉiam respondi al demandoj faritaj al li de iu ajn serioza studanto de nia lingvo.

Dum la jaroj de sia Esperantista vivo li neniam ĉesigis sian detalan esploron de la verkoj de Zamenhof, kaj li kompilis mirinde ampleksan Konkordancon de ĉiuj jam eldonitaj verkoj. Li esperis vivi ĝis apero de la ankoraŭ neeldonitaj verkoj de Zamenhof (*Fabeloj IV kaj V*), por ke li povu kompletigi sian Konkordancon; sed la terura milito forrabis de li tiun ĝojon. Tamen, lia Konkordanco staras kiel la plej granda kaj impona monumento memore de li. (Mi kuraĝas proponi, ke se la Esperantistoj deziras fari praktikan tributon de danko kaj estimo al li, ili ne povos fari ion pli taŭgan tiucele, ol ebligi la publikigon de lia Konkordanco post ĝia kompletigo. Tio necesigus la starigon de Memoriga Kaso. Sendube William Bailey helpis milojn da gesamideanoj per la respondoj kaj artikoloj, kiujn ebligis lia Konkordanco. Miloj da donacoj de helpitoj (kaj de aliaj) ebligus ĝian presigon, por ke nuntempaj kaj estontaj studantoj de nia lingvo povu aĉeti ĝin por propra kaj konstanta uzado.)

Li tiel malavare foruzis sian liberan tempon, respondante al sciemaj korespondantoj kaj helpante verkistojn, ke restis al li malmulte da tempo por aŭtora laboro. Jam de 1906 li faris kontribuadojn al diversaj gazetoj Britaj kaj alilandaj, kaj ĉiam liaj artikoloj havis apartan valoron kaj intereson. Elstara ekzemplo estis la kritiko pri la *Originala Verkaro*, kiun li verkis por la Japana gazeto *Revuo Orienta* (1937). Li multe helpis A. E. Millidge ĉe la kompilado de lia Vortaro, ankaŭ la Biblian Komitaton ĉe la preparado de la manuskripto de *La Biblio* por la presistoj. Estas tre bedaŭrinde, ke li mem neniam entreprenis la tradukadon de unuaranga klasikaĵo, de verko vere kaj plene inda de lia vasta erudicio kaj de lia aparte edukita lingva talento. Liaj publikigitaj tradukoj estas *Penspotenco*, *Progresado kaj la Pasinteco*, *De Tutmonda Perforto al Tutmonda Frateco*, kaj *Petrolo*. Oni sciigis en *The British Esperantist* (Nov. 1936), ke li jam tradukis alian libron, pli indan de lia kapablo. Supozeble la milito nebligis ĝian eldonigon.

William Bailey aliĝis al B.E.A. en 1906 kaj fariĝis Fratulo en 1912. Li estis Hon. Prezidanto de la Esperantista Federacio de Lancashire kaj Cheshire, kaj Vic-Prezidanto de la Esperantista Societo de Manchester. Dum tre multaj jaroj li estis ano de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, kaj fariĝis Prezidanto de la Sekcio de Komuna Vortaro ĉirkaŭ 1935. Li retenis ĉiujn ĉi tiujn oficojn ĝis sia morto—je la 5a de Aŭgusto, 1946.

Lia vivhistorio malkaŝas, ke li havis karakteron fortan, memstaran, mal-



egoisman ; kaj temperamenton detaleman, elserĉeman, ĝisfundeman. Ĉiam li volis scii la nekontraŭstareblajn faktojn, kaj li estis preta sindone dediĉi sin al la tasko eltrovi ilin, malgraŭ tio, ke tiu tasko ofte estis longa, teda, kaj paciencopostula. Eltrovinte la faktojn, li ĉiam volonte donis al ĉiu, kiu sin turnis al li kun prilingva demando, la helpon kiun ili ebligis. Ĉiu korespondanto konstatis, ke li estas viro kun fortaj neflekseblaj konvinkoj ; tamen, ke malgraŭ sia eminenteco li estas vere modesta. Li neniam provis altrudi siajn proprajn juĝojn. Volonte, ĝentile, kun granda helpemeco, li donis al petintoj faktojn kaj konsilojn tute fidindajn—esperante, ke tio efikos gvidi la petintojn sur la aŭtentikan Zamenhofan vojon. Fortege li deziris, ke ĉiuj uzantoj de nia lingvo iru sur tiu vojo, ĉar li klare vidis la danĝerojn, kiuj minacus Esperanton, se la gesamideanoj perdus sian lojalecon al la *Fundamento* kaj al Zamenhof. Tio facile povus okazi, se oni tro akcentus la fakton, ke Esperanto estas "vivanta lingvo de vivanta popolo", kaj sekve tro libere kaj senpripense praktikus la principojn de oportuneco, natura evoluado, k.s. William Bailey ĉiam pledis, ke, por evitigi al nia kara lingvo disfalon en tian ĥaosan staton, kia karakterizas ĉiun nacian lingvon, ĉiu Esperantisto volonte akceptu la disciplinon imiti kiel eble plej fidele la modelan vortuzadon kaj stilon de la Majstro.

Ja bedaŭrinde estas, ke la Morto forrabis de ni la saĝan sanigan influon de tia amiko—bonkora, helpema, scihava, kaj celkonscia. Nia afero perdis unu el siaj "gigantoj", unu el siaj plej eminentaj, plej dankindaj altgvidantoj. En la 80a jaro falis sur lin la dormo, el kiu li neniam vekiĝos sur ĉi tiu tero. Kun malgaja koro ni donas al li la finan saluton : kaj por plej inde kaj valore honori lian memoron, ni des pli provos imiti lin laŭ spirito, laŭ sindediĉo, laŭ fideleco al la fundamentaj idealoj de la kreinto de nia lingvo. Dankan adiaŭon, samideano !

W. J. DOWNES

## OPERACIO "STELO"

En ĉiu milito venas momentoj, kiam gravaj preparoj eniras la fazon de aplikado. Tio validas ankaŭ en aferoj pacmilitaj, kvankam ĉe ili la afero ne estas tiel okulfrapa, ĉar la pacaj ideoj realiĝas per epizodoj malpli spektaklaj.

Nun, tamen, post la furiozado de kanonoj kaj bomboj, denove por Esperanto kolektiĝas la pacaj batalantoj, kaj rapide kreskas la afero. En multe da landoj la gesamideanoj kolektas petskribojn por prezento al UNO.

Adoptante militan terminologion, ni povus apliki al tiu laboro la titolon "Operacio Stelo". Sendube ĝi komencos novan etapon en la progreso de nia afero. Ni povas atendi, ke Esperanto estos sub la serioza konsiderado de la nova internacia instanco. Favana decido povus enkonduki gravajn paŝojn de la evoluo de internaciaj rilatoj.

Por laŭeble helpi al la influo de la petskribo, ĉiu Esperantisto devas kolekti kiel eble plej multe da subskriboj. Ĝis 1 Okt. la nombro estas 152963. 14624 estas el Britujo, kiu okupas la kvaran lokon.

### LANDOJ

Aŭstralio	.. 2209	Islando	.. 3775
Aŭstrujo	.. 51	Italujo	.. 1463
Belgujo	.. 3385	Jugoslavujo	.. 9236
Brazilo	.. 4129	Kanado	.. 231
Britujo	.. 14624	Maroko	.. 947
Bulgarujo	.. 20557	Nederlando	.. 27123
Ĉeĥoslovakujo	7799	Norvegujo	.. 9572
Danujo	.. 3777	Nov-Zelando	2200
Egiptujo	.. 1411	Palestino	.. 387
Finlando	.. 6189	Polujo	.. 11
Francujo	.. 6257	Portugalujo	.. 3115
Germanujo	.. 574	Sud-Afriko	.. 68
Grekujo	.. 473	Svedujo	.. 15409
Hindujo	.. 54	Svisujo	.. 910
Hungarujo	.. 2376	Usono	.. 3947
Irlando	.. 209	Ceteraj lokoj	.. 195

### OKUPOJ

Artistoj	.. 851	Lingvistoj	.. 112
Delegitoj		Metiistoj	
Komunumaj	188	Diversaj	.. 11045
Dentistoj	.. 237	Navigaciistoj	598
Desegnistoj	.. 837	Parlamentanoj	76
Dommastrinoj	22882	Policistoj	.. 909
Edukaj		Presistoj	.. 1440
Aŭtoritatuloj	497	P.T.T.-istoj	.. 3301
Elektristoj	.. 1172	Religiistoj	.. 540
Farmacistoj	498	Sciencistoj	.. 579
Farmistoj	.. 6007	Sindikateĉefoj	2163
Hotelistoj	.. 650	Soldatoj	.. 1963
Inĝenieroj	.. 5382	Studentoj	.. 13429
Instruistoj	.. 8604	Ŝoforoj	.. 1186
Juristoj	.. 726	Ŝtatoficistoj	.. 3450
Jurnalistoj	.. 494	Teksistoj	.. 722
Komercistoj	.. 26068	Transportistoj	6856
Konstruistoj	2791	Urboficistoj	.. 1593
Kuracistoj	.. 2051	Vendistoj	.. 4337
Laboristoj	.. 10291	Vestistoj	.. 2187
		Diversaj	.. 8098

Memevidente, la cifero por Britujo ne estas kontentiga. Minime ni devas ĝin almenaŭ triobligi. Ĉiu klopodu energie, laŭ plena povo. Ĉiu grupo racie sin turnu al lokaj eminentuloj, parlamentanoj, urb-konsilantoj, rotarianoj, komitatoj de organizoj religiaj, pacaj, kaj tiel plu. La laboro estas urĝa. Ni kaptu la okazon, antaŭ ol estos tro malfrue. E.D.D.

## NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A., others from the address given.

**Elektitaj Fabeloj de Fay Andreás (Andreo Fai).** *El la Hungara trad. Maŭro.* 36 pp., 4 resp. kuponoj (inkl. de aŝranko), ĉe Szalay, Esperanta Librejo, Esperanto-strato 39, Budapest VIII.

Kolekto de 29 fabeloj, kun biografio. Tute leginda, kaj lukse eldonita. Por esti sincera, tamen, oni devas konfesi, ke de literatura vidpunkto la stilo estas nur mezgrada. Saĝo de esprimo, elekto de radiko pli ĝusta, aldono de pronomo, forigo de erareto, rearanĝo de vortordo—aferoj kiom etaj! Tamen ĉe ili kuŝas la diferenco inter la verko de inteligenta lernanto kaj la kreaĵo de majstro!

**Une Humanité : Une Langue.** Simone Glodeau. 48 pp., prezo ne montrita. SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, Paris XX.

Nova propagandilo Franclingva, en ok ĉapitroj. Enhavo: La neceso por I.L. Principoj de serĉado. Diversaj projektoj. Vivo de Zamenhof. Strukturo de Esperanto. Sukcesoj atingitaj. Eduka kaj ideala valoro de Esperanto. Estonta agado. La verko prezentas la movadon freŝe, racie, kaj konvinke; de SAT-vidpunkto, tamen simpatie por ĉiu. Ni deziras por ĝi grandan disvastiĝon kaj sukceson.

**\*La Virineto en Bluo, kaj aliaj rakontoj, originale verkitaj de Mason Stuttard.** EPOKO-libro N-ro 8. 150 pp., 3\$, aŝr. 2p.

Mason Stuttard estas jam bone konata en la Esperanta mondo, aparte pro la artikoloj kiuj aperis lastatempe en *Esperanto Internacia*. La stilo kaj enhavo de tiuj artikoloj klare pruvas, ke li tre kompetente uzas nian lingvon kaj ankaŭ posedas neordinaran klarecon, do la eldono de lia unua literatura verko estas afero tre bonvena—kaj eble grava.

*La Virineto en Bluo* estas la unua el dek tri mallongaj sed interesaj rakontoj kun tre diversaj temoj. Ili nepre alportos plezuron al la leganto. Mi senhezite laŭdas la verkon kaj rekomendas ĝin. La lingva stilo estas klara kaj trafa; kaj kvankam la literaturo nivelo ne estas tiom alta, kiom mi atendis, mi sincere gratulas Stuttard pri ĉi tiu (lia unua) verko.

Fakte, mi imagas, ke la rakontoj estas verkitaj dum kelkjara periodo, kaj ke la kvalito tial varias. Kelkaj donas la impreson, ke la verkinto intence provas sian kapablon, kaj ekzercas sin per esperantigo de jam pretaj rakontoj aŭ anekdotoj; ekzemple *Naivuloj alilande* estas plilongigo de anekdoto bone konata, eĉ antikva, kaj *La Virineto en Bluo* similas al dekoj—eĉ

centoj—da romantikaj historietoj, kiuj aperas en eldonaĵoj por mezklasaj sinjorinoj. Aliflanke du-tri, ekzemple *Patruja grundo*, *La danĝera loko*, evidente estas originalaj, kaj tiom bonaj, ke ili montras, ke Stuttard posedas ion pli ol nura kompetenteco. Mi tial esprimas la opinion, ke li baldaŭ povos esti elstaranta verkisto.

Mi permesas al mi doni al li unu konsilan vorton. Li iom tro facile transprenas Anglajn esprimmanierojn en Esperanton. Ekz., "prenu la aferon de . . .", "kio (t.e. iu fakto) parolis pri vivo eksterdoma "lasis pensi", "havis plendon", "bela kalkulo".

Papero kaj preso estas bonegaj, kaj konformas al la alta nivelo de la EPOKO-libroj. Tamen enŝoviĝis kelke da preseraroj. Ekz., *flanka* (*flanke*), 69/16; *komforte* (*komforta*), 69/26; *al* (*el*), 109/24; *leterom* (*leteron*), 126/33, *tuta* (*tutan*), 49/15. *Smith* (*Brown*) kaj *Kompanio*, p. 58. *Nove venontojn* (99/4) skribiĝus pli bone kiel unu vorto.

W.A.G.

**Who are the Finns? A Study in Pre-history.** R. E. Burnham. (Faber and Faber, 7s. 6p.)

Jen aŭtoritata verko pri la Ugro-finnaj popoloj, bazita sur la prahistorio, etnologio, kaj lingvo-scienca. Al la "arbaruloj"—la praloĝantoj en Finnlando—venis ĉirkaŭ 2000 A.Kr. portantoj de la "batal-hakila" kulturo; kaj, en la bronzepoko, Teŭtonidoj de trans la Balta maro. La Finnoj mem eniĝis en la sudajn regionojn en la unua jarcento post Kristo, kunportante pruntvortojn el la Litova. Ilia prahejmo troviĝis verŝajne norde de la Kaŭkazo, kie la Ugro-finna popolfamilio najbaris al Irane parolantoj. La pra-finna grupo elmigris unue, pasante norden tra la Volga regiono, kie postrestis Mordvinoj kaj Ĉeremisoj (Mari), kaj de kie disbranĉiĝis la Okcident-Finnoj kaj la Permfinoj (Sirjenoj aŭ Komi kaj Votjako aŭ Udmurt). Plej longe restis la Ugroj, el kiuj la Ungaroj venis al Mezeŭropo dum la 9a jarcento kaj la Ob-ugroj transpasis la Uralojn en Siberion en la 12a jarcento. Hodiaŭ en la Sovjetunio estas kvar aŭtonomaj respublikoj de Finnidoj (Mordvin, Mari, Udmurt, Komi). kun preskaŭ 3½ milionoj, kaj la Vogul-Ostjaka nacia teritorio kun 17,000 Ob-ugroj.

W. E. COLLINSON

**Pacplanoj "laŭ la karto".** Edith Wynner. Okpaĝa represo de artikolo el *Amerika Esperantisto*. Klare kaj interese priskribas diversajn projektojn por organizo de Monda Federacio. Ĉe "World Government", 343 S. Dearborn St., Chicago 4, Ill., U.S.A. Prezo 5c (unu respondkupono); 50 por unu dolaro.

**New Tongues.** Prof. E. Allison Peers. Pitman, 1945. 140 pp., 10/-.

This book is sub-titled *Modern Language Teaching of the Future*, and the greater part of it consists of a discussion of the place which foreign tongues should hold in education. The cultural and utilitarian values of the chief European languages are dealt with, and suggestions are made as to the best methods of encouraging their study in schools and universities.

Much could be said, both in criticism and commendation, on the presentation of this interesting subject by Prof. Peers. (For example, he completely omits any consideration of Esperanto as a means of promoting this study, or of its claims to an important place on the curricula of the schools of the future.—Ed.)

The part of special moment to Esperantist readers, however, is the concluding chapter: *Why not an International Language?* The author's treatment of this question is confused and inconclusive. He admits the great potential utility of such a tongue, and advances very sound arguments for its adoption, but fails to draw a clear distinction between the practical necessity of simplifying international intercourse for day-to-day purposes, and the "cultural" aspects of the great national languages. He toys with Basic English, but does not explain how native English speakers are to use it properly: in fact, he says it is not intended "for sensitive and educated Englishmen" ("So what?" one may enquire)! He mentions Esperanto among other "invented languages", but has some very erroneous ideas regarding it. He is evidently quite unaware, for example, of its complete and overwhelming success in practical use and of its demonstrable educational value, or of its established position as a living international tongue, to the virtual exclusion of all so-called "rivals".

It may be suggested to Prof. Peers that he should himself study Esperanto, and should attend next year's Universal Esperanto Congress at Berne; after which he will be in a position to judge more competently of its intrinsic qualities, present status, and future possibilities.

VERDANO

**\*The Case for Esperanto.** P. L. Wright, Jason Press, 6p. afr. 1p.

It is a welcome sign of the times that this work has been published by a non-Esperantist organization. When much outside literature touching on the I.L. question is ill-informed—or worse, the World Unity Movement has rendered itself and our movement a service by publishing this

brochure by a well-known Esperantist. The limit set by 15 pages of text renders a profound treatment impossible, but the author gives us a light roving view of the language, its aims, structure, and theory. The book contains also a reprint of the B.E.A. Educational Manifesto, and an 8-page "Information Supplement" advertising Classes, the London Club, B.E.A., I.E.L., S.A.T., T.J.O., and U.L.

A pamphlet is not a documentary, but a medium of transient interest, the value of which lies in its ability to leave a lasting and favourable impression. "The Case for Esperanto" should be useful and effective for this purpose.

E.D.D.

**Testamento de Sveda Esperantisto**—Meze de Julio mortis S-ro Albin Soneson. Lia testamento ordonas, ke post depreno de 3,500 kr. la tutan havaĵon heredu ŝveda Esperanta Federacio kaj Sveda Laborista Esp-Asocio. Kaj li aldonas: "Mi deziras je mia enterigo nek paroladojn nek florojn. Sed se iu deziros honori mian memoron, li tion faru per donaco al la Esperanta movado".

**La Internacia Asocio "Bellamy"** (Torenstraat 26, Beverwijk, Nederlando), volonte sendos informojn pri siaj celoj kaj laborado.

**"Skotlando Vokanta"**—Kiu povas donaci al B.E.A. Biblioteko N-ron 8 de tiu gazeto? Skribu antaŭe.

**Bezonataj por instrua kurso**—Artikoloj de 300 vortoj, verkitaj Esperante aŭ alilingve, pri la ĉiutaga vivo de la verkinto, aŭ pri iu okupo al li konata (profesia, metia, spirita). Ekz., tago en la vivo de tajpistino, librovendisto, k.t.p. Se eble, sendu plurajn artikolojn. Edward G. Lock, 12 Hamel Rise, Hemsworth, Yorks.

**Esperanto in Singapore**—We have received an order for books from the Hou Chio Public School, Singapore, in which Esperanto is being taught.

**Libroj de C. Minor** (p. 178)—La vendo atingis £37.

**The Editor regrets** that through pressure on space many contributions and communications are held over till the next issue.

**"The Charter"** (Coventry Training College) contains an article "Overcoming Babel" by J. H. Sullivan.

**La Franca Eduka Movado "Presarto en Lernejo"** (Adreso: Lentaingn, Belaruc-les-Bains, Hérault, Francujo) havas Korespond-Servon, kiu celas praktikigi Esperanton al infanoj eĉ ankoraŭ ne Esperantistaj. Petu informojn.

“**La plej ofta eraro ?**” (p. 178)—S-ro A. Venture skribas pri la “misuzo” de *lasta anstataŭ fina*: “Ŝajnas al mi, ke oni povas skribi, ekzemple, *Morgaŭ estos la lasta tago de nia kongreso*, ne farante eraron. Oni povas argumenti, ke la proponita diferencigo (inter *lasta kaj fina*) estus logika, sed laŭ mia sperto ĝi ne konformas al la Esperanta lingvouzo. Laŭ P. V. *lasta=estanta post ĉiuj ceteraj*: laŭ Kabe, *kiu venas post ĉiuj aliaj*. Ekz. *la lastaj tagoj de la libertempo, lastaj paĝoj de libro, la antaŭlasta silabo; lasta en la vico, lasta gasto*. Oni ja povas uzi *lasta* en la limigita senco *ĝisnune lasta* (kvankam oni ofte uzas anstataŭe la vorton *pasinta*), sed estas erare kaj erarige skribi, ke la vorto *lasta* havas nur tiun signifon”.

Diversaj korespondantoj citas la uzon de *lasta* ĉe Joh 6/39, 11/24; 2 Tim 3/1; 1 Joh 2/18.

S-ro Evans respondas: “Estas evidente, ke mi almenaŭ parte eraris: uzo kiun mi supozis simpla eraro estas uzo enradikiĝinta kaj rekonata. Tamen diferencigo certe ekzistas. Oni ne povas uzi la vorton *fina* por ambaŭ, sed nur por unu, el du apartaj sencoj de la vorto *lasta*. *Lastatempe (recently)* ne estas anstataŭigebla per *finatempe*. Oni ne skribus *artikolo en via fina numero*, se la gazeto daŭre aperos . . . Do, ne plu parolante pri “eraro”, mi kredas, ke estas preferinde eviti uzon de *lasta* en la senco por kiu ekzistas *fina*. *Pasinta* ne ĉiam sufiĉas. En *pasintaj (bygone)* jarcentoj oni ofte kredis, ke tuj venos la *fina tago (the last day)*; kaj oni ofte surpriziĝis ĉar la *lasta jaro* ne estis la *fina (yester-year had not been the final year)*, tiel, kiel oni antaŭe profetis”.

(Resume: la *fina* nepre estas la *lasta*, sed la *lasta* ne ĉiam estas la *fina*.—Ed.)

**Foto de Pastro Cseh**—S-ro Derrick P. Faux, The Bungalow, New Drive, Painswick, Glos., faris poŝtkartan foton de Pastro Cseh dum la Bristola kongreso, kaj estas preta sendi ekz. al BEA-anoj po 1ŝ. afr.

“**The Highway**” (organ of W.E.A., 38a St. George’s Drive, S.E.1) now appears monthly. 4/6 twelve issues, post free).

**The Bulletin of the British-Polish Correspondence Club** (3 Novar Crescent, Kirkcaldy, Fife) contains letters for and against Esperanto, with very sympathetic Editorial comment.

**Nine schoolboys** from Hounslow College, with their teacher (Mr. K. Sly), visited the Esperanto Summer School for young people held 10 Aug.—10 Sept. at L’Arbreste, Rhône, France. We have a cutting from

the local paper, and a photo. An account was broadcast from Lyon, Grenoble, and Montpellier. Esperanto courses, excursions, and a concert, filled a very enjoyable programme, and many friendships were made between boys of England, France, and the Netherlands.

**Pacifista Movado de Patrinoj** — Por informoj skribu al S-ino M. Goulliart, Boite Postale 58, Versailles, kun respond-kupono por respondo.

“**Pola Esperantisto**” reaperis (Rynek Gl. 34, ofic. IIIp., Krakow., Polujo)—La du unuaj numeroj enhavas longan liston de mortintoj: el kiu ni elĉerpas kelke da nomoj internacie konataj: Prof. Odo Bujwid, 85-jara; Lidia kaj Sofia Zamenhof, murditaj de Germanoj en Varsovio; Adam Zamenhof, murdita en Germana mal-liberejo; Leono Rosenstock (Napoleono), dum la milito en Rusujo; Jakobo Ŝapiro (Joŝo), murdita de Germanoj en Varsovia geto; Leo Belmont, en Varsovia geto; D-ro Wilhelm Robin, murdita de Germanoj; Izrael Lejzerowicz (Georgo Verda), gasumita de Germanoj; Leopold Drener (Leo Turno), murdita de Germanoj; D-ro Maksymilian Blassberg, pereis en Germana koncentrejo; Adolf Oberrotman, gasumita de Germanoj; Edward Wiesenfeld, pereis en koncentrejo; Pastro Lucjan Kukulka ĝismorte turmentita en Germana koncentrejo . . .

La Pola Esperantistaro kongresis Pentekoste, kaj decidis reorganizi la movadon. Mankas Esp. bibliotekoj kaj lernolibroj (detruitaj de la Germanoj), kaj preskaŭ ĉio bezonata, tamen oni kuraĝe ekpaŝas.

## 32nd UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS BERN, SWITZERLAND

26th July—2nd August, 1947

Enrolments are coming in well. We would remind those who think of attending the Congress that the present Congress fees of 30/- (for wife or husband 15/-; those under 21, 12/6) remain in force until the 31st December only. After that date the fees will be 35/-, 18/- and 15/- until the 31st March. An enrolment form appeared in the previous issue, but further copies can be obtained from the Office.

*Travel Parties to Bern*—The B.E.A. is arranging travel parties to the Congress, but information regarding accommodation in Bern has not come to hand in time for full details to appear in this issue. **Look out for an important announcement in our next number.** Meanwhile, JOIN THE CONGRESS NOW!

We hope to give some details of Congress arrangements in our next issue.



# THE BRITISH ESPERANTIST



with which is incorporated

INTERNATIONAL LANGUAGE

Volume XXXV  
1945—1946

41ST AND 42ND YEARS

Redaktisto : MONTAGU C. BUTLER

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.

140 HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11

# TABELO DE ENHAVO

- Alphabet, The Esperanto*, 42, 67  
 Angla Esperanto, 129, 140  
 Angla lingvo kaj E., 132, 149  
 B.B.C. kaj E., 131, 178  
 B.E.A. *Advertising Fund*, 6, 24, 53. *Annual Circular*, 22, 122. *Annual Report*, 17, 117. *Financo*, 17, 20, 117, 120. *Grupoj*, 58, 65. *Jarkunveno*, 57, 158. *Kongreso (Vd. Bristol)*. *Kotizo*, 122, 124, 138. *Kursoj*, 18, 37, 118.
- BIBLIOGRAFIJAJ NOTOJ—M. C. Butler, 172. D. D. Evans, 179. C. C. Goldsmith, 17, 85. E. Hindle, 95. J. W. Holland, 93. H. F. Latimer, 110, 147. E. Lentz, 133. T. S. Lindsay, 164. F. McDonald, 127. D. W. Munns, 65. E. Privat, 90. Lady Baden Powell, 179. F. G. Rayer, 36. E. F. Relf, 111. G. W. Roome, 29. Mrs. Roosevelt, 147. C. E. Simon, 9. H. Snell, 83. G. Tordoff, 158. F. F. Vaughan, 90. P. Wagstaff, 110. L. G. Watson, 158. R. B. Wilkinson, 85, 88.
- Birmingham Central Library*, 110  
 Brazil, E. en., 44, 49  
 Bristola Kongreso, 153  
*British Esperantist, The*, 18  
*British League of Catholic E-ists*, 133  
*Co-operative Esp. League*, 111  
 Denaska Esperantistaro, 133  
 Diservo Esperanta (en ĉiu numero)  
 Edukado kaj E., Vd. *Lernejoj*  
 EDZIĜOJ — Baker-Long, 128; Barnes-Palmer, 79; Bastock-Taylor, 181; Delgado-Bailey, 107; Newland-Marshall, 194; Rankin-Tucker, 59; Simpson-Lowe, 79; Stephenson-Gardiner, 95; White-McAuslan, 51  
 Ekzamenoj (en ĉiu numero)  
*English or E. in B.E.*, 140  
 English when she should not be spoke, 193  
*Esperanto, a foreign language for the non-linguistic*, 101  
*Evolution and Growth of E.*, 104  
*Forces and E.*, 39  
 Gazetaro, La Esperanta, 73, 191  
 Germanujo, E. en, 100, 110, 111, 178  
 Grupestroj, Konsiloj por, 146  
 Heroldo de Esperanto, 128  
 IEL-UEA, 181
- India and the Language Problem*, 148, 166  
 Instruado de Esperanto, 2, 57, after Index  
 Instruo de Esperanto, VI 28, VII 47, VIII 60  
*International Stamp Collectors' Assn.*, 179  
 Islamo kaj E., 114, 143  
 Japanujo, E. en., 179  
*John Buchanan Prizes*, 77, 170  
 Junuloj kaj E., Vd. T.J.O.  
 Kial lerni E., se ne por ĝin uzi? 89  
 Konsiletoj pri Instruado, after Index  
 Kvinpinta Stelo, La, 39, 56  
 Lancs. and Cheshire Federation, 128  
*Language Barrier, The*, 49, 87, 90, 95, 111 (bis), 133, 146, 148, 166 (bis)  
*Leakey Fund*, 33  
*Learning Esperanto, On*, 81  
 Lectures (en ĉiu numero). *Statistiko*: 29, 106, 153  
 Lernado de E. (Vd. "Instruado")  
 Lernejoj, E. en la., 101, 156 (Vd. "Lectures")
- LINGVAJ NOTOJ—*Accented letters*, 42, 67. Angla Esperanto, 129, 140. Arbarisma Terminaro, 65. Artificiality, 90. Botanika Terminaro, 69. **Cerambiko**, 90. **Desapont** 79. Elizio, 162. **Fin-last** 178, 190. *Gear*, 72. Grafismo kaj Fonetismo, 42. Hejmlaboro, 60. Historio kaj Organizo de E., 47. Instruiloj, 60. **Islam**, 114. **Iufoje**, 174. Kantoj, Tradukado de 47. **Konduktor**, 91. Legado, 28. Lumigo-scienca Terminaro, 174. Mnemonikoj, 40. Muzika Terminaro, 7. Neologismoj (*New Roots*), 104. **op**, 87. **Plenmano da**, 174. Pliperfektigo, 60. Radikoj, 28. "Ridge", 73. Stilo, 47. Saka Terminaro, 80, 87. **Sat**, 87. "Talkative", 132. Teknikaj Terminoj, 69. Tradukado, 47. Verkado, 29. "Way", 108. Zoologia Terminaro, 69.
- Lingvoj naciaj kaj Internaciaj, 62  
 Liverpool University kaj E. (Vd. "John Buchanan")  
 Londona Klubo, La, 40  
 Miskompreno (komedio), 11  
 Modern Language Assn., 9  
 MORTOJ (Vd. "Bibliografio"). E. Arnold, 59. W. Bailey, 181, 186. G. Bairstow, 107. E. G. Beves, 59. A. L. Beveridge, 150. N. Bland, 59. F. H. Bolton, 181. W. J. Brigden, 164. A. L. Briggs, 26.

T. G. Briggs, 26. W. Browne, 51. R. Caw, 59. J. Chadwick, 107. A. C. Chambers, 150. A. Chapman-Taylor, 110. A. Clinton, 26. W. B. Currie, 181. A. O. Eaves, 16. P. H. Fearnley, 181. A. Fisher, 107. G. Gordon, 181. W. E. Hailstone, 181. G. F. B. Hall, 194. A. Hooper, 164. M. Jones, 95. J. L. Katterns, 59. R. C. Klavehn, 181. C. S. Middlemiss, 107. F. Milward, 95. C. Minor, 181. A. Moore, 59. D. W. Munns, 51. G. D. Nash, 128. W. Norris-Jones, 51. E. O'Brien, 150. S. G. O'Brien, 16. E. L. Osmond, 5. F. Parkin, 194. J. W. Patterson, 79. W. G. Phipps, 95. H. Reed, 194. Mrs. Rhodes, 26. J. Robbie, 133. C. H. Roche, 59. L. Sewell, 26. F. M. Sexton, 128. Mrs. Spackman, 95. A. E. Stacy, 194. W. Thistlethwaite, 95. W. Todd, 165. Mrs. Wallace, 95. J. E. Wells, 79. J. B. West, 181. J. E. Whitaker, 111. I. H. Wright, 59

NASKIĜOJ—E. R. Acton, 26. C. S. Allen, 164. C. B. Ames, 59. A. P. Bailey, 107. P. G. Dixon, 95. M. C. Goodes, 107. L. M. Hueting, 16. R. J. Knight, 107. J. Lee, 26. T. J. Oliver, 51. N. Penny, 107. H. A. Revill, 194. K. M. Sullivan, 95

N.C.L.C. kaj E., 56  
Nederlando, E. en., 179  
Neŭtraleco, 56  
Nova Propagandrimedo, 108

Omnibusa Idilio, 83, 91  
Open Letter, An, 94

Parlamento kaj E., 14  
Pensoj de Soldato-Sciencisto, 98  
Polujo, E.en, 190  
*Press Propaganda*, 49  
*Progressive Proletarian, The*, 41, 56  
Propagando (Vd. "Lectures")  
Public Opinion Poll kaj E., 49

RECENZOJ—Bredado de Abeloj, 161. *Case for E.*, 189. *Choice of a Common Language*, 175. D-ro Dorner, 131. Dua Rapsodio, 91. Elektitaj Fabloj, 188.

Enkonduko en Studadon de Spiritismo, 145. Esperantista Studrondo, 103. Fino, La, 112. Forto de l' Vero, 87. Fotometria Atlaso de Suna Spektro, 174. Gaja Leganto, 145. Granda Aventuro, 142. *Green Star*, 176. Hasse Z., 86. Islamo Esperantiste Rigardata, 143. Jarlibro de IEL, 7, 109, 161. 50 Jarojn kun Paul Nylén, 87. *Language as a Social Factor*, 160. Londonanidoj, 144. Malgranda Révuo, 112, 162. Maljunulo Migras, 86. Mi serĉas oron, 161. Muzika Terminaro, 7, 50. *Nelson's Esperanto Course*, 173. *New Tongues*, 189. Okazaĝ Nenio, 144. Pasko, 162. Pastro en Vjelbye, 112. Perfido, La, 130. Pli ol Fantazio, 143. Preĝlibro por Spiritistoj, 86. Romeo kaj Julieto, 74. Suno kaj Sano, 131. Taglaboristoj, 157. Tejo kaj Ĉerik, 10. Tra Densa Mallumo, 176. Virineto en Bluo, 188. Voĉoj de Poetoj, 48. Vortaro pri Lumigoscienco, 171. Waverley Course, 143.

R.S.A. Ekzamenoj, 30, 83, 105  
Rusa Lingvo kaj E., 38

S.B.E.T., 45, 102, 183, 194  
*Sec. Modern Schools and E.*, 101, 141  
*Simplified Spelling*, 89, 107

Ŝaka Terminaro, 80, 82, 87

Technical Terms in E., 69  
T.J.O., 93, 102

UNO, Petskribo al, 137, 169, 187, 194  
Utiligo de E., 49, 127, 193

*Variations on a Scottish Melody*, 108  
Vidaĵo Ŝanĝiĝas, La, 2

VERSAĴOJ—Adiaŭ Glenŝaloh, 108. Amkanto, 91. Espero, La, 192. Jen! la belaj sonoriloj, 111. Jerusalemo, 57, 72. Kanto sincera, 48. Tempo forpasas, La, 79

Women's International League kaj E., 147  
*Woodcraft kaj E.*, 65

Zamenhofaĵoj ne tre konataj, 79  
Zigzagoj de la Angla lingvo, 149

## FORM OF BEQUEST

*I give and bequeath (free of duty) to The British Esperanto Association, Incorporated, whose present address is 140 Holland Park Avenue, London, W.11, the sum of £....., to be used for the general purposes of that Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of that Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such legacy.*

## KONSILETO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO

Se la kurso estas duhora, memoru (precipe se vi dumtage instruas profesie) ke du horoj estas longa tempo por geviroj kiuj jam laboris tutan tagon, eble ankaŭ devis vojaĝi sinlacige por labori, kaj por ĉeesti la kurson. Ne atendu, ke la anoj faru formalan laboron dum la tuta periodo. Permesu iom da diskuto kaj babilo, eĉ pri temoj apartaj de Esperanto—tio povas esti refreŝiga al lacaj cerboj. Sed kompreneble ne lasu, ke oni tro longe forvagu.

